der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

14. Jahrgang | Nr. 91 (5/1978) | 30 Pf

Kongresa rezolucio

La partoprenantoj en la 63-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Varna, Bulgarujo, de la 29-a de Julio ĝis la 5-a de Aŭgusto 1978-a, diskutis pri la temo „Internacia Lingvo, Internacia Edukado".

Ili konstatis, ke:

- la ĉiaspecaj rilatoj trans landaj, kulturaj kaj lingvaj limoj fariĝas pli kaj pli multnombraj kaj multflankaj, kaj ke same rapide kreskas la neceso pri sendiskriminacia kunlaborado trans tiuj limoj;
- edukado por internaciaj kompreniĝo, kunlaboro kaj paco estas nepra antaŭkondiĉo por atingi harmonian kaj justan disvolviĝon de tiuj rilatoj kaj de tiu kunlaborado;
- ekzistas ne preteratenteblaj aspektoj lingvaj de la edukado por internaciaj kompreniĝo, kunlaboro kaj paco.

Ili alvokas la internaciajn kaj landajn institucionjn kaj organizaĵojn:

- aparte memori la esencan gravecon de edukado al internacia kompreniĝo en spirito de egaleco kaj reciproka respekto, esprimitan ekzemple en la „Rekomendo de U.N.E.S.K.O. pri Edukado por Internaciaj Kompreniĝo, Kunlaboro kaj Paco kaj Edukado rilate al Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj";
- prikonsideri, ke tiu eduka procedo etendiĝas tra la tuta vivo kaj ne estas limigita nur al formala klerigo;
- atenti, ke internacia kompreniĝo antaŭsupozigas la necesajn rimedojn, inkluzive de la lingvaj rimedoj;
- esplori la efikon al internacia kompreniĝo de la nuna lerneja kaj eksterlerneja edukado, kaj pristudi alternativajn modelojn, utiligante ankaŭ la eksperimentojn faritajn kaj faratajn en pluraj landoj, interalie sub aŭspicio de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (I.L.E.I.), pri la lerneja instruado de la Internacia Lingvo Esperanto;
- kaj esplori la spertojn akiritajn dum pli ol naŭdek jaroj per la lernado kaj uzado de la Internacia Lingvo Esperanto, kiu ebligante senperan ĉiudirektan aliron al aliaj kulturoj, edukas siajn uzantojn al plivastigo de la propra alrigardo al la mondo kaj al respekto de kultura diverseco.

Varna, la 5-an de aŭgusto 1978

La 63a Esperanto-Kongreso: La vere universala

Jes, oni supozis, ke la 63a Universala Esperanto-Kongreso en Varna farigos granda. Sed la realeco superis ĉiujn imagojn. En Varna okazis la dua plej granda kongreso en la historio de la Esperanto-movado (la 15a 1923 en Nurenbergo, Germanio, havis 4963 aligintojn): Partoprenis pli ol 4500 esperantistoj el 47 landoj. Multaj esperantistoj, precipe el socialismaj landoj, havis unuafoje la eblecon partopreni tiun plej grandan manifestacion de la Esperanto-movado.

Nur el GDR partoprenis pli ol 100 personoj, el USSR 115, 300 venis el ĈSSR kaj 400 el Hungario, 800 el Pollando 1500 el Bulgario. Ankaŭ el Rumanio ĉeestis 50 personoj, kaj ne mankis niaj amikoj el Socialisma Vjetnama Respubliko.

Retrorigardante oni nur povas gratuli al la Loka Kongresa Komitato, prezidita de Nikola Aleksiev, ke ili transprenis kaj realigis tiun ege malfacilan taskon, organizi *tian* kongreson. Eble nek ili nek „Balkanturist" kalkulis pri tia dimensio. Se oni ja rimarkis la sinoferan laboron de la LKK, kiu ĉiam klopodis solvi plej komplikajn taskojn, oni bedaŭrinde ne povas laŭdi „Balkanturist", kiu postlasis ne tro bonan impreson ĉe multaj, tro multaj kongresanoj. Sed ni lasu tion kaj prezentu, kio restos pozitiva en la memoro, nome la kongreson, kiun kvalifikis la prezidanto de UEA d-ro Tonkin, kiel kongreson *vere universalan*. Kaj tia gi estis. La partopreno estis universala same la kongrestemo.

Gravas mencii, ke krom la kutimaj partopreno-landoj ĉifoje partoprenis esperantistoj ankaŭ i. a. el Burundio, Jemena Popola Respubliko, Mongolio, PR Ĉinio, SR Vjetnamio kaj Zairio.

Centran Laborrondon reprezentis 5-kapa oficiala delegacio, la membroj de la prezidio d-ro Detlev Blanke, Rudolf Hahlbohm, Hans Heinel, Siegfried Linke kaj Werner Pfennig. Krome 60 personoj el GDR utiligis la servojn de la vojagoficejo kaj pluraj 30 — 40 veturis individue. La oficiala solena malfermo, kiel kutime, okazis en ĉeesto de diplomatoj. Ĉeestis ankaŭ la Alta Protektanto de la Kongreso, la Unua Vicprezidanto de la Ŝtata Konsilantaro de Bulgario, s-ro Petr Tanĉev. El GDR la malfermon partoprenis en la komisio de la ministerio por eksterlandaj aferoj, s-ro Hanisch, la Ĝenerala Konsulo de GDR en Varna.

„Internacia Edukado — Internacia Lingvo"

La malfermigo de UEA al la tutmondaj problemoj — en kies kadroj la lingvoproblemo ne estas preterrigardebla — jam montrigis dum la lastaj kongresoj, speciale klare 1977 en Rejkjavik („La rajto je komunikado"). Ankaŭ ĉijare la kongreso traktis temon universale gravan, temon, kiun UNESKO speciale priatentadas: Internacia Edukado.
Bonegan bazon donas la dokumento de UNESKO „Rekomendo pri Edukado por Internaciaj Kompreniĝo, Kunlaboro kaj Paco kaj Edukado rilate al Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj", kiu estas akceptita de la Ĝenerala Konferenco 1974 en Parizo kaj kiu aperis ĉijare en la Esperanta traduko.

Do oni povus imagi ĝin bonega kongresa temo „Internacia Edukado — Internacia Lingvo“. Sed la ofte mallarĝa lingvoproblema prismo, tra kiu la movado tro rapide kaj tro senkondiĉe emas rigardi ĉion en la mondo, misgvidis al elekto de inversigita temo: La oficiala kongresa temo ja estis, nelogike „Internacia Lingvo — Internacia Edukado“. Tiu renverso de la prioritato konsekvence kondukis al neutiligo de grava ŝanco: nome prezenti al la politika eminentularo, partopreninta la inaŭguron, la seriozan kulturan kaj spiritan kontribuon de la Esperanto-movado en la hodiaŭa mondo. Anstataŭ reliefigi la grandajn edukajn kaj klerigajn valorojn, kiujn povas doni Esperanto kaj ĝia movado al la mondo, oni dum la malferma solenaĵo prezentis konsiderojn pri: memlernado, studrondoj, korespondaj kursoj, eksterlernejaj kursoj, varbado al kursoj, novaj parolantoj de Esperanto, Esperanto kaj pli aĝaj personoj. Nur ĉe la fino de tiu listo venis, finfine, la ĉefpunktoj: Internacia edukiĝo kaj Esperanto (ĉifoje en la ĝusta vicordo), lernado kaj samtempa kleriĝo. Vere, prezento ne laŭa al la pompa diplomatia kaj ŝtatestra kadro de la inaŭguro!

Jes ja, ĉu la diplomatoj ne devis miri? „Mont' gravediĝis, muso naskiĝis!“ Feliĉe la prezidanto de UEA en konata klara kaj konstruiva maniero en la lasta minuto iom klarigis pri la celoj de UEA. Tre eminente li finfine dum la Dua Ĝenerala Kunsido de UEA elstarigis la gravecon de la problemoj de la internacia edukado, kaj li trovis tiujn lokojn kie la lingva problemo efikas bremse kaj kie sekve UEA povas doni sian gravan kontribuon. Sed tiu vere elstara kontribuo ja mankis dum la malfermo. Se ni havintus do la temon „Internacia Edukado — Internacia Lingvo“, tiam oni devus a) klopodi pli profunde disvastigi la idealojn kaj humanismajn celojn de UNESKO *en la movado*, b) montri al UNESKO, kie la lingvoproblemo estas bremsa faktoro alvokante al *utiligo de la 90-jaraj spertoj de la Esperanto-movado.*

UNESKO

Ankaŭ ĉi-jare montriĝis la daŭre kreskanta intereso de UNESKO pri la Esperanto-movado. La Ĝenerala Direktoro Amadou-Mahtar M'Bow sendis mesaĝon (vidu sube) kaj reprezentanton al la kongreso, s-ron Zakariev, kiu forte interesiĝis pri la kongresaj laboroj. La prezidanto de UEA kaj liaj komisiitoj havis lastatempe diversajn utilajn renkontiĝojn kun funkciuloj de UN kaj UNESKO. Tiu komponento de la agado de UEA estas netakseble grava kaj certe donos siajn rezultojn, espereble ankaŭ per celkonforma kongrestemo 1979 dum la 64a UK en Lucerno/Svisio.

Scienco

Se temas pri edukado, ankaŭ gravas konscii pri la neceso eduki la movadon. Temo ĉi-tie detale ne traktebla, kvankam de fundamenta signifo. Ĉiukaze necesas eduki la movadon al kompreno pri la graveco de la scienco. Feliĉe kreskadas la konscio en UEA kaj ekster ĝi, ke la scienco ludos ŝlosilan rolon por la estonteco de Esperanto. Tion esprimis en sia posttagmeza malferma parolado la prezidanto de UEA kiel ankaŭ diversaj landaj salutintoj, inter ili la prezidanto de la ĵus fondita „Kolektivo Interlingvistiko-Esperanto“ ĉe la Akademio por Politikaj kaj Sociaj Sciencoj de Rumanio, prof. d-ro I. Bociort. La scienca komponento dum la kongreso bone funkciis. Okazis, kiel kutime, la prelegoj kadre de la Internacia Somera Universitato (Margarete Landmark/Norvegio: „Pri unu

tipo de malfacilaĵo en la lernado de skribado“, Vasil Ĉoĉov/Bulgario: „Utiligado de la libera tempo“, Vilmos Benczik/Hungario: „Teoriaj problemoj de la Esperanto-literaturo“, Aurel Boia/Rumanio: „La baza vortprovizo kaj la vortstatistikaj studoj en Esperanto“, Wim. M. A. de Smet/Nederlando: „La balenoj, minacataj gigantoj de la oceanoj“, Sergej Krajnov/USSR: Hipofeo, kuraca, nutra kaj grundon-pliboniga planto de Eŭrazio“, Jonathan Pool/Usono: „Elementa modelo por la solvado de la problemo de lingva diverseco“, Laszlo G. Kárpáti/Hungario: „Komputilaj retoj kaj la lingva problemo“, Saburo Yamazoe/Japanio: „Kio estas prostaglandinoj?“, Sinitirô Kawamura/Japanio: „Plantaj fibroj kiel komponaĵoj de manĝaĵoj“).

Novaĵo kun neatendite granda sukceso estis la Internacia Esperantologia Konferenco, kiun iniciatis kaj gvidis d-ro Detlev Blanke el GDR. Ĝi okazis sub la aŭspicioj de ISU kaj CED. En plenplenega salono (pli ol 120 personoj) dum tri kunsidoj 9 prelegantoj prezentis esperantologiajn (resp. interlingvistikajn) prelegojn (Detlev Blanke/GDR: „Kelkaj problemoj de internacie kunordigita esperantologia esplorado“; Arni Böðvarsson/Islando: „Rilato inter lingvo, penso kaj nocioj, el Esperanto kaj okcident-eŭropa vidpunktoj“; Naokazu Kawasaki/Japanio: „Lingvistika terminaro en Esperanto“; Olav Reiersøl/Norvegio: „Problemoj de matematika terminaro“; Karolo Piĉ/ĈSSR: „Evoluo de Esperanto“; François Lo Jacomo/Francio: „La lingvistika balasto“; Stojan Ĝuĝev/Bulgario: „Estetikaj problemoj de la lingvo internacia“; Boris Kolker/USSR: „Interlingvistika agado en Soveta Unio“; W. A. Verloren van Themaat/Nederlando: „La internacia vortaro, ĝia signifo por la dezirinda formo de la planlingvo“).

La prelegotekstoj same kiel tiuj de ISU estas riceveblaj kiel fotokopiaĵo ĉe UEA fine de la jaro.

Menciindas krome du kunvenoj de la Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo Problemo (CED), kies ĉefa projekto estas la eldonado de revuo „Lingvaj Problemoj kaj Lingva Planado“ (posteulo de „La Monda Lingvo-Problemo“, de kiu aperis 18 kajeroj).

Krome CED aperigas ĉijare libron de J. C. Wells „Lingvistiko kaj Esperanto“ kaj preparas „Bibliografion de Vortaroj de Esperanto kaj aliaj planlingvoj“ (redakto de M. Ĝivoje kaj E. Ockay). Sub redakto de P. Neergaard aperos la kompletigaĵoj al la dua volumo de la revuo „Esperantologio“. Konsiderata estas esperantigo de la ruslingva libro „Problemi interlingvistiki“.

Fakaj kunvenoj

Dum la kongreso entute okazis pli ol 150 diversaj aranĝoj kaj kunsidoj, inter ili grandan parton formis la fakaj kunvenoj, i. a. de la juristoj (kiuj fondis novan internacian asocion), filologoj, ĵurnalistoj, instruistoj, matematikistoj, sciencistoj, medicinistoj, agraraj specialistoj, foto-kino-magneto-fono-amatoroj, muzikistoj, poŝtistoj-telekomunikistoj, radioamatoroj, ornitologoj, ŝakludantoj, turistoj k. t. p. La Akademio de Esperanto okazigis (kiel kutime bedaŭrinde nepublikan) kunsidon. Por la lingva perfektigo servis la tuj-kurso pri la bulgara lingvo, Che-Seminario, progresiga kurso (Jürgen Hamann, GDR), konversacia rondo kaj ne laste la kelkparta kvizo „Por ke vi sciu . . .“

Nova programero estis la aranĝo de la Komisiono por Virina Agado (i. a. Julie Tonkin: „Pri vojaĝantaj sinjorinoj de la 19a jarcento“, Viktor Sadler: „La verkanta virino“).

Pri Esperanto kaj Olimpiaj Ludoj 1980 en Moskvo okazis speciala kunveno.

La publika MEM-kunveno, en plenplena salonego diskutis aktualajn problemojn de la nuntempa batalo por la paco, omaĝis al 25-jara jubileo de MEM kaj akceptis rezolucion (vidu sube).

Sendepende de la kongreso krome okazis la VIIIa Ĝenerala Konferenco de MEM, en kies kadro oni elektis la novajn gvidinstancojn de tiu pligraviĝanta internacia porpaca esperantlingva movado (vidu sube).

Kulturo

Ankaŭ ĉijare la kongreso ofertis ege riĉan kulturprogramon. Bulgara Esperanto-Teatro, kiu festis sian 20-jaran jubileon, prezentis la komedion „La Megero“ de A. Straŝimirov. (Kiam BET finfine prezentos modernajn teatraĵojn???) La abunde troveblaj esperantistaj kantistaj talentoj de la kongresa lando kaj el aliaj landoj sin prezentis dum Distra Foiro. Oni aŭskultis tri korusojn en speciala koncerto. Pola Esperanto-Teatro prezentis „La hipnoto“. Dum la Internacia Arta Vespero artistoj el 8 landoj prezentis sian arton. Elstaras la bulgara kantisto Veselin Damjanov, kies plenan kaj vere eminentan baritonon oni ankaŭ povas ĝui de la longdaŭra disko „Veselin Damjanov kantas en Esperanto“. Bulgara Vespero, la Pupteatro (ŝtata, el Varna) kaj neoficiala koncerto de Gianfranco Molle kompletigis la vere abundan oferton. Krome oni montris diversajn filmojn, i. a. „Kvar ĉapitroj GDR“.

Turismemuloj povis abunde elekti, se ankaŭ la suno ne ĉiam tro favoris la kongresanojn.

Komitataj kunsidoj

Plej ĉasataj kongresanoj sendube estas la komitatanoj. Ili senĉese kuris de unu kunsido al alia. La Komitato de UEA ĉi-kongrese akceptis Esperanto-asociojn el Brazilio, Venezuelo, Peruo, Meksikio kaj Malto. Ankaŭ la nova statuto de UEA estis unuafoje diskutita kaj trovis ĝenerale favoran konsideron. Ĉijare denove montriĝis tamen, ke la Komitato tro multe devas solvi kaj trakti teknikajn problemojn kaj ne havas sufiĉe da tempo por okupiĝi pri strategiaj aferoj de la estonta agado de UEA. Ja valoras pli detale diskuti multajn bazajn temojn, i. a. pri Kongresoj, scienco kaj Esperanto-movado, eksteraj rilatoj de UEA, kiel eduki la movadulojn?, estontaj strategioj k. t. p.

Tamen, klare montriĝis denove, ke la afereca kaj problemkonscia agado de la Estraro, sub prezidanto d-ro Tonkin, de la Komitato kaj de multaj aktivuloj, bone progresigis la asocion kaj donis gravajn stimulojn por la estonto.

Sendube, la 63a Universala Kongreso de Esperanto en Varna apartenos al la plej sukcesaj kaj postlasos siajn spurojn.

Detlev Blanke

Junulara Kongreso

Pri la 34a IJK vi trovos raporton en „de“ 6/78.

El la „Rekomendo pri Edukado por Internaciaj Kompreniĝo, Kunlaboro kaj Paco kaj Edukado rilate al Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj" de UNESKO

Studado pri la ĉefaj problemoj de la homaro

18. *Oni direktu edukadon al (a) la forigo de kondiĉoj, kiuj daŭrigas kaj pligravigas la grandajn problemojn ligitajn al la homaj pluvivo kaj bonfarto - malegaleco, maljusteco, internaciaj rilatoj bazitaj sur perforto - kaj al (b) agoj de internacia kunlaborado, kiuj povas solvi ilin. Edukado, kiu ĉi-rilate nepre devas esti interdisciplina, rilatu al tiaj problemoj, kiel la jenaj:*

(a) egalrajteco de ĉiuj popoloj, kaj la rajto de la popoloj decidi pri si mem;

(b) la konservado de paco; diversaj specoj de milito kaj iliaj kaŭzoj kaj efikoj, malarmado; la nepermeseblo utiligi sciencon kaj teknikon por militaj celoj, kaj ilia utiligo cele al paco kaj progreso; la naturo kaj efiko de ekonomiaj, kulturaj kaj politikaj rilatoj inter la landoj kaj la graveco de internacia juro por tiuj rilatoj, precipe por la konservado de paco;

(c) agado celanta la praktikon kaj observon de homaj rajtoj, inkluzive tiujn de rifuĝintoj; rasismo kaj ĝia forigo; la lukto kontraŭ diskriminacio en ĝiaj diversaj formoj;

(d) ekonomia kresko kaj socia evoluo, kaj ilia rilato al socia justeco; koloniismo kaj malkoloniigo; rimedoj por helpi evolulandojn; la lukto kontraŭ analfabeteco; la kampanjo kontraŭ malsano kaj malsato; la batalo por pli bona vivokvalito kaj kiel eble plej alta nivelo de saneco; kresko de enloĝantaro kaj rilataj demandoj;

(e) la utiligo, regado kaj konservado de naturaj rimedoj; polucio de la homa medio;

(f) konservado de la kultura heredaĵo de la homaro;

(g) la rolo kaj agmaniero de la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj en klopodoj por solvi tiajn problemojn, kaj eblecoj por plifortigi kaj entaŭenigi ĝian agadon.

19. Oni faru paŝojn por evoluigi la studadon de tiuj sciencoj kaj kampoj, kiuj rekte rilatas la praktikon de la ĉiam pli diversaj devoj kaj respondecoj ligitaj al internaciaj rilatoj.

★

Esperanto-Dokumentoj

UEA eldonadas kajero-serion sub la titolo „Esperanto-Dokumentoj" (nova serio). Ĝis nun aperis: 1. UNESKO kaj UEA 1954—1974, 2. La kontribuo de Universala Esperanto-Asocio al la monda paco, 3. Esperanto tra la etero, 1922—1975, 4. Enkonduko al Esperanto-studoj, 5. Universala Esperanto-Asocio en la Internacia Jaro de la Virino 1975, 6. Internacia turismo de la parolantoj de Esperanto, 7. Lingvaj problemoj kaj la Fina Akto, 8. La lingva problemo en la Eŭropa Komunumaro, 9. Esperanto kaj la pliaĝuloj, 10. Esperanto: Ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?

Ekzistas angla varianto de tiu serio sub la titolo „Esperanto Documents" (new series). Ĉiu kajero ampleksas ĉ. 10—20 paĝojn.

Urĝaj problemoj de la homaro kaj la lingva problemo

(El la fermaj vortoj de d-ro H. Tonkin, prezidanto de UEA dum la antaŭtagmeza inaŭguro de la 63a UK)

Karaj gekolegoj!

Finante la nunan konsidon, mi tamen deziras emfazi, precipe por niaj gastoj, la celojn de nia agado kaj la vojon, laŭ kiu ni direktas nian energion. La kunveno ĉi-matene ne similas aliajn internaciajn kunvenojn; ĝi okazas sen la interveno de tradukistoj kaj interpretistoj, ĝi okazas en spirito de plej profunda harmonio. Kvankam neniu saĝa parolanto de Esperanto asertus, ke la nura utiligo de Esperanto kreas harmonion, ekzistas nenia dubo, ke la diverseco de la lingvoj en la internacia sfero grave malhelpas la internacian kunlaboron. Ankaŭ neniu saĝa parolanto de Esperanto asertus, ke la nura ekuzo de unu lingvo por internacia agado aŭtomate metus nutraĵon en la stomakojn de tiuj, kiuj malsatas, aŭtomate resanigus tiujn, kiuj suferas pro plej teruraj malsanoj, aŭtomate alfabetigus tiujn, kiuj ne scias legi kaj skribi. Sed la utiligo de unusola lingvo por la internaciaj kontaktoj inter la homoj ebligus ilin finfine fronti rekte kaj senŝancele tiujn demandojn. La lingva problemo ne estas samnivela problemo kiel la problemo de malsato aŭ malsano aŭ analfabeteco aŭ la demando pri milito kaj paco — sed la solvo de la lingva problemo estas unu el la antaŭkondiĉoj de la solvo de tiuj aliaj urĝaj problemoj de la homaro.

Kaj kiel solvi la lingvan problemon? Ĉu per utiligo de unusola *nacia* lingvo en la internacia sfero? Iri tiun vojon, signifus redukti al duaklaseco ĉiujn, kiuj ne denaske regas tiun lingvon. Ĝi estus rekta lingva diskriminacio, same koroda al la animo kaj materia stato de la homoj kiel rasismo kaj seksismo.

Cetere, la ĝisnunaj spertoj montris, ke kvankam la lernado de fremdaj lingvoj estas grava elemento en la internacia edukado, ĝi postulas grandegajn investojn kaj ne estas ĉiam sukcesa.

Antaŭ vi troviĝas la fenomeno de Esperanto — racia alternativo al la lukto de la lingvoj. Nia Asocio staras preta helpi pri la enkonduko de Esperanto en la internacian agadon.

Ni forigu, unu fojon por ĉiam, la barilon de la lingvoj en la internacia socio. Tio estas nia celo.

*

Kontrakto inter CLE kaj KKĈSE

Dum la 63-a Universala Kongreso Centra Laborrondo Esperanto kaj la Kunordiga Komitato de Ĉeĥoslovakaj Esperantistoj (Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko) subskribis kontrakton pri amikeco kaj kunlaboro. La tekston ni publikigos en unu el la sekvontaj numeroj de „der esperantist".

Mesaĝo de Amadou-Mahtar M'Bow

Ĝenerala Direktoro de la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESKO) al la 63a Universala Kongreso de Esperanto (Varna, 29a julio – 5a aŭgusto 1978)

Ne povante alparoli vian Kongreson, kiel mi faris la pasintan jaron en Rejkjaviko, mi deziras direkti al vi, en mia propra nomo kaj ankaŭ en la nomo de la Organizo, kiun mi estras, mian plej koran saluton.

UNESKO ekkonos la konkludojn de viaj debatoj kun des pli da interesiĝo, ke la kongrestemo, dediĉita precipe al la internacia edukado, tuŝas plurajn demandojn, kiuj estas ankaŭ inter ĝiaj propraj zorgoj: edukado al la plenaĝuloj, plibonigo de la instruprogramoj por la Tria Mondo, Rekomendo de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO pri edukado por internaciaj kompreniĝo, kunlaboro kaj paco kaj edukado rilate al Homaj Rajtoj kaj fundamentoj liberecoj.

Tiel vi pretiĝas por apliki en la eduka kampo tiun serĉadon de unu *komuna lingvo* — en propra kaj figura sencoj —, kiu estas la ekzistokialo mem de Universala Esperanto-Asocio. Kun plej laŭdinda persistemo vi faris vin la pioniroj de internacia kunlaboro, kiu malfermas novajn vojojn al dialogo inter la popoloj kaj inter la kulturoj. Miaj plej varmkoraj kuraĝigoj akompanas vin ĉe tiu ĉi nobla tasko kaj mi formulas la deziron, ke vian laboradon kronu la plena sukceso, kiun ĝi meritas.

*

Radio kaj gazetaro pri la kongresoj

Jam antaŭ la kongreso la amasmedioj de GDR iom interesiĝis. La radiostacio „Berliner Rundfunk“ disaŭdigis la 28an de julio 1978 intervjuon pri Esperanto kaj pri la 63a Universala Kongreso.

La gazetnovaĵa bulteno de ADN en julio entenis ampleksetan informon pri la 63a UK kaj la 34a TEJO-Kongreso. Diversaj gazetoj utiligis tiun materialon respektive raportojn liveritajn de lokaj esperantistoj. Mencindas i. a. „Leipziger Volkszeitung“ (20. 7 + 22./23. 7. 78), „Märkische Union“ (Potsdam, 25. 7. 78), „Die Union“ (Dresden, 19. 7. 78). Pri la Junulara Kongreso i. a. raportis „Bauernecho“ (26. 7. 78), „BZ am Abend“ (25. 7. 78), „Das Volk“ (Erfurt, 25. 7. 78), „Thüringische Landeszeitung (Weimar, 25. 7. 78), „Neues Deutschland“ (25. 7. 78), „Der Demokrat“ (Schwerin, 25. 7. 78).

Pri la 63a UK i. a. raportis „Neues Deutschland“ (1. 8. 78), „Berliner Zeitung“ (1. 8. 78), „Thüringische Landeszeitung“ (1. 8. 78), „Neue Zeit“ (Berlin, 1. 8. 78), k. a. Pleje elstaras granda artikolo en „Junge Welt“ („100 jaroj Esperanto“) de Jürgen Hamann en la numero de 10. 8. 78.

El la salutparolado

de Petar Tanĉev, unua vicprezidanto de la ŝtata konsilantaro de Popola Respubliko Bulgario kaj prezidanto de la honora komitato de la 63-a Universala Kongreso de Esperanto

Mi estas feliĉa prezenti al vi la varmajn kaj plej elkorajn salutojn de la ŝtatestro de Popola Respubliko Bulgarujo Todor Ĵivkov — granda amiko de la esperantistoj el la tuta mondo, kiu alte taksas la internacian lingvon Esperanto kiel lingvon de paco kaj amikeco inter la popoloj . . . La ĉefa temo de via Kongreso, ĉerpita el la rekomendoj de UNESKO pri edukado en spirito de internacia kunlaboro, estas tre aktuala. El tiu temo vi prenis nur unu punkton: „Internacia lingvo, internacia edukado", ĉar tio estas la kerna esenco de la Esperanto-movado.

Mi estas profunde konvinkita, ke la traktado de tiu temo surbaze de la internacia Esperanto-movado, donos al via kongreso pli grandan nuntempan nuancon kaj celkonformecon. Tio estu via kontribuo al la solvo de la tuthomara tasko dum la 63-a UK de Esperanto, kongreso, kiu eniras en la Esperantan historion kiel unu el la plej amasaj kaj imponaj kongresoj.

Tre nature, via movado havos la plej bonajn kondiĉojn pri realigo de novaj sukcesoj tiam, kiam la homaro ekvivos en paco kaj sekureco, kiam ĝi forigos por ĉiam la militon kiel rimedon por solvo de internaciaj konfliktoj; kiam ĝi povos multigi la riĉaĵojn de la kulturo, kreitajn dum jarcentoj.

Nur tiam, movado kiel la via, povos trovi ankaŭ pli grandan moralan kaj materialan apogon en nacia kaj internacia skaloj.

Sendube, per Esperanto vi kontribuos al forigo de la malamo inter la popoloj, vi laboros por la konservo de paco kaj amikeco inter ili, por la firmigo kaj evoluigo de fido inter homoj el la kvin kontinentoj.

Viaj tradiciaj kongresoj datiĝas ekde la komenco de nia maltrankvila dudeka jarcento. Inter la franca urbo Boulogne-sur-Mer kaj la bulgara Varna ekzistas longa ora rozario de Universalaj Kongresoj. La rozarion interrompis tragikaj eventoj de ambaŭ mondmilitoj, kiuj pereigis dekojn da milionoj de homoj kaj ruinigis enormajn materialajn kaj spiritajn valoraĵojn.

Mi forte kredas, ke mi esprimas la volon de vi ĉiuj: „Neniam plu milito: Neniam plu homaj viktimoj kaj materialaj detruoj, por ke la homaro povu krei en paco kaj ĝui la fruktojn de sia laboro", „Por ke vi, esperantistoj, povu okazigi viajn kongresojn nur en pacaj tagoj!".

La bulgara socio rilatas tre simpatie al la noblaj streboj de la esperantistoj, ĉar en ilia personeco ĝi vidas sincerajn agantojn pri reciproka interkompreniĝo en la mondo, pri fruktodona kunlaboro inter la ŝtatoj, sendepende de ilia socia ordo.

La publikaj organizaĵoj, kiuj aktivas en la nomo de noblaj homaj celoj, devas etendi al si la manojn. Por realigi tiujn celojn necesas ne nur la klopodoj de sobre pensantaj ŝtatistoj, sed ankaŭ la larĝa subteno de la publika opinio, kiu ĉiam pli kaj pli estiĝas potenca faktoro . . .

Deklaro de la MEM-kunveno

La batalo por paco en la tuta mondo estas morala devo de ĉiu homo, de ĉiu esperantisto

La publika jubilea kunveno de Mondpaca Esperantista Movado okazinta la 31an de julio 78 en la kadro de la 63a Universala Kongreso de Esperanto en Varna (29. 7. — 5. 8. 78), post la raporto de la MEM-prezidanto kaj la diskuto fare de ĉeestantoj, deklaras:

1. La sorto de la estonta evoluo kaj fina venko de la problemo pri internacia lingvo Esperanto dependas de la pozitiva solvo de la plej ĉefa problemo de nia epoko — la konservo de la paco en la mondo kaj utiligo de la grandiozaj pormilitaj elspecoj por kulturaj kaj humanaj celoj.
2. La 25-jara jubileo de Mondpaca Esperantista Movado evidente montris la veran vojon al grupiĝo de ĉiuj esperantistaj porpacaj fortoj kun la sennombraj fortoj de amaso da neesperantistaj landaj kaj internaciaj organizoj kaj movadoj. Nur tiu grupiĝo, integriĝo kaj unueco de la pacfortoj prezentas garantion por la venko de la paco en la grandioza, komplika kaj malfacila batalo kontraŭ la fortoj de la militinstigantoj.
3. Pro la ege grandiĝinta rolo de la monda publika opinio oni povas fari novajn decidajn paŝojn en la porpaca batalo, se la unuigitaj pacfortoj tutplene apogos la realigon de la rekomendoj de la Speciala Sesio de Unuiĝintaj Nacioj por kunvoko de internacia registara konferenco por malarmado, kiu sola povas preni devigajn mezurojn kaj liberigi la popolojn el sub la pezega ŝarĝo de la militelspezoj farataj aktuale.
   Unualoke oni devas kontraŭbatali la produktadon de precipe danĝera neŭtrona bombo kaj de aliaj novaj sistemoj de amasmortigiloj, postuli daŭran plibonigon de la politika klimato kaj ties kompletigo per laŭgrada, plena kaj ĝenerala malarmado de ĉiuj ŝtatoj sub internacia kontrolo.
4. La kunvenintoj apelacias al ĉiuj esperantistoj decidiĝi al sistema kaj daŭra partopreno en la streboj de ĉiuj pacfortoj por konservo de la paco. Al la paco kaj al la milito praktike neniu povas resti neŭtrala, eĉ se li dèziras tion sincere. Pli bone aktiva en la pacbatalo ol pasiva en la atompereigo de la homaro.

La kunveno

INTERNACIA RENKONTIĜO DE KURSGVIDANTOJ — IKURE Berlin —

Ĉu vi jam anoncis vin? — Faru tuj! Vidu paĝo 17 en „d.e." n-ro 4/78 Ni atentigas, ke estos la ebleco ekzameniĝi laŭvole — kvalito B —.
Deviga literaturo por la germanaj partoprenontoj estos:

Faka scio laŭ enhavo de „der esperantist", gramatiko laŭ Göhl, „Esperanto Sprachlehre" kaj „Esperanto: Lingvo, movado, instruado" (vidu „d.e." n-ro 4/78, paĝo 19).

Se vi intencas partopreni la ekzakemnon, bonvolu mencii sur via aliĝilo. Aliĝilojn forsendas

DISTRIKTA LABORRONDO ESPERANTO
en KB de GDR
Berlin
110 Berlin, Postfach 67

Oka Ĝenerale Konferenco de MEM

Sendepende de la 63a Universala Kongreso de Esperanto okazis la Oka Ĝenerala Konferenco de MEM la 1-an de aŭgusto 1978. Ĝin partoprenis delegitoj de la MEM-sekcioj, inter ĩli el GDR Rudolf Hahlbohn, Jürgen Hamann kaj d-ro Detlev Blanke. Post salutparoladoj, la tre materialriĉaj kaj valoraj raportoj de la ĝen. sekretario William Gilbert, la administrantino Vasja Petrova kaj la ĉefredaktoro de „Paco" Violin Oljanov, sekvis diskuto kaj elekto de la novaj organoj de MEM. Prezidanto elektiĝis d-ro Imre Pethes el Hungario. D-ro Pethes, vicprezidanto de Hungara Fervojista Esperanto-Asocio, transprenas la prezidantecon post 15-jara sukcesa agado de la multmerita bulgara aktivulo Nikola Aleksiev. Pro sia sanstato N. Aleksiev petis senŝarĝon. La Konferenco elektis la kreinton de la moderna MEM honora prezidanto. En la Internacian Komitaton el GDR eniris d-ro Detlev Blanke, Helmut Fuchs, Rudolf Hahlbohm, Jürgen Hamann, Hella Sauerbrey, Ingrid Schödl, Ludwig Schödl. Jürgen Hamann fariĝis prezidanto de la Junulara Komisiono, d-ro Blanke estonte okupiĝos pri la kunordigado de la eldonado de landaj numeroj de „Paco". La konferenco akceptis rezolucion.

Rezolucio

de la Oka Ĝenerala Konferenco de MEM en Varna, la 1an de aŭgusto 1978

La Oka Ĝenerala Konferenco de MEM okazas en momento tre decida por la estonteco de la homaro. La reakciaj fortoj frunte kun la Usona registaro faras grandajn klopodojn por revenigo de la mondo al la epoko de la „malvarma milito". Per tio oni strebas likvidi la sukcese komenciĝintan sereniĝon[1]) en la internaciaj rilatoj kaj precipe la sindevigojn de la registaroj aprobitajn en Eŭropa konferenco pri sekureco kaj kunlaboro (Helsinki 1975). Tiu imperiisma politiko ege minacas la konservon de la monda paco kaj starigas la homaron antaŭ tre danĝeran krucvojon: aŭ konservo kaj pliprofundigo de la sereniĝo[1]), kondukanta al sekurigo de la paco, aŭ kreoj de reala minaco de katastrofa mondmilito.

La provoka sinteno de NATO kontraŭ la rekomendoj de la okazinta en junio 78 en Novjorko Speciala Sesio de UN por Malarmado ankoraŭfoje substrekas la nepran bezonon de unueciĝo kaj aktiviĝo de ĉiuj pacfortoj por bremsi la realigon de la militinstigaj planoj kaj certigi antaŭ la homaro la vojon de malstreĉeco kaj paco. Tio estas la esenca enhavo de la decidoj de MPK[2]) — Prezidantaro (Moskvo, julio 78).

En tiuj cirkonstancoj oni povas pritaksi pozitive la ĝisnunan agadon de MEM en realigo de la decidoj de la Sepa Ĝenerala Konferenco (Ruse 1976). MEM aktivis en direkto de pliprofundigo de la internacia sereniĝo[1]) kontraŭ la reakciaj planoj de la imperiismo.

Oni povas objektive konstati plikreskintan aŭtoritaton de MEM en la vicoj de la monda movado de pacadeptoj. Sed samtempe oni ne povas pretervidi gravajn mankojn en la MEM-agado, precipe en ties specifa tasko grupigi kiel eble plej grandan parton de la esperantistaro en porpacajn aktivecojn kun neesperantistaj pacorganizaĵoj, kaj pli vastan utiligon de Esperanto kiel pontlingvo en la kontaktoj de diverslandaj pacadeptoj kaj organoj en la spirito de nia dokumento por komuna agado kun MPK.

La Oka MEM-konferenco

decidas

1. En la antaŭstaranta periodo de streĉa batalo kontraŭ la reakciaj fortoj por konservo de la sereniĝo[1]) kaj ties transformo en daŭran fenomenon

MEM aktivigu siajn sekciojn kaj perantojn por pli energia laboro cele al la realigo de la rekomendoj de la Speciala Sesio de UN por Malarmado apogante la rekomendojn de MPK kaj kunlaborante kun neesperantistaj organizaĵoj kaj movadoj por konservo de la paco en la tuta mondo.

2. La Sekretariato de MEM serĉu eblecon por garantii partoprenon de MEM-delegitaroj en internaciaj aranĝoj kun neesperantistaj organizaĵoj celantaj pliaktivigi la mondan movadon de pacadeptoj por konservo de la paco.
3. La 25-jariĝo de MEM instigu ĉiujn organojn de MEM al plia organiza stabiligo de nia movado, kreo de novaj sekcioj, propagando de MEM-idealoj inter plej vastaj esperantistaj medioj troviĝantaj ankoraŭ sub la influo de la pasiveco en la batalo por paco.
4. Akcelu la redakciojn de „Paco“ (oficiala serio kaj de la landaj eldonoj) pliakcentigi la mobilizon de la esperantista publika opinio al subteno de ĉiuj iniciatoj por malarmado kaj sereniĝo[1]). Por „La Pacaktivulo“ oni instigu la sperto-interŝanĝon de MEM-sekcioj kaj perantoj en la laboro por organiza stabiligo de MEM.

La konferenco esprimas sian profundan kredon en la fina venko de la pacidealoj de la homaro super la nigraj fortoj de la imperiismo. Samtempe la MEM-anoj konscias, ke tiamaniere ili kontribuas por pli alta prestiĝo de internacia Esperanto-movado kaj por kreo de realaj cirkonstancoj por morala kaj materiala subteno de Esperanto fare de landaj kaj internaciaj ŝtataj, interŝtataj kaj sociaj organoj kaj organizoj.
Al energia laboro por realigo de la decidoj de la Oka MEM-konferenco!
Al pliaj sukcesoj de la Esperanto-movado en landa kaj internacia skalo!
Al pli sistema utiligo de Esperanto por la celoj de la pacbatalo!
Varna, Bulgario, 1-a de aŭgusto 78

[1]) pli bone: malstreĉiĝo [2]) Tutmonda Packonsilantaro

27a Hungarlanda Esperanto-Kongreso

Ĝi okazis 14.—16. 7. 1978 en Budapeŝto kaj partoprenis ĝin 200 gesamideanoj, inter ili multaj eksterlandanoj, ĉefe el Pollando, sed ankaŭ eĉ el Madagaskaro. El Centra Laborrondo Esperanto (CLE) en Kulturligo de GDR partoprenis d-ro Till Dahlenburg kaj Helmut Lehmann.
Hungara Esperanto-Asocio havas gravajn kontaktojn al aliaj sociaj asocioj. Ĝi estas forte subtenata de la sindikatoj. Pli kaj pli en la uzinoj formiĝas Esperanto-brigadoj. Dum la malferma kunveno de la kongreso salutparolis reprezentantoj de la plej altaj instancoj de la Laborista Partio, de la sindikatoj, la junularorganizo kaj de la Ministerio por Popolklerigado.
Dum la kongreso ankaŭ kunvenis gejunuloj kaj veteranoj kun specialaj temoj. Pluraj temoj pritraktis varbadon kaj nian laboron por la paco. Dum la Packunveno d-ro Dahlenburg tre lerte kontribuis per diskuto. Li menciis, ke Esperanto ne estas memcelo, sed helpilo por atingi pacon. Pro tio oni ĝin ankaŭ nomu ilon, do ekzemple oni ne skribu „Esperanto kaj paco“, sed inverse „Paco kaj Esperanto“ k. s. rilate al aliaj temoj.
Tre kortuŝa estis solena florkronado ĉe la tombo de Aurel Ŝtromfeld. Ŝtromfeld estis revoluciulo de la Hungara Konsilantara Reŝpubliko en la dudekaj jaroj kaj elstara esperantisto.
La hungaraj gastigantoj tre amike kaj bonkore prizorgis la eksterlandajn gastojn, do ankaŭ la delegitaron el GDR. Pro tio nian koran dankon.

Helmut Lehmann

Pri la agado de Pola Studenta Esperanto-Komitato (PSEK) en Socialisma Asocio de Polaj Studentoj (SAPS)

Studenta Esperanto Movado en Pollando okupiĝas en sia agado pri diversaj temoj de scienca kaj organiza karaktero. Ĉar estas bezono kolekti kaj kompili ĝisnunajn verkojn, spertojn k. t. p. oni komencis redakti specialajn materialojn. Ili estas eldonataj kiel scienc-edukaj broŝuroj kaj koncernas jenajn temojn: interlingvistiko, socilingvistiko, lingva problemo, projektitaj lingvoj, Esperanta literaturo. Esperantistaj organizaĵoj, metodiko de Esperanto-instruado, agado de la Esperanto-rondoj, organizado kaj programoj de la kursoj por gvidantoj. La broŝuroj estas reviziataj far la Eksperta Kolegio de PSEK.

Aŭtune 1978 Studenta Esperanto Movado organizas kune kun la Pola Sekcio de Internacia Studenta Monda Unuiĝo (ISMUN) unuan lingvo-sociologian seminarion sub la temo: „La Monda Lingva Problemo". Organizantoj invitas eksterlandajn gastojn kiuj interesiĝas pri tiu temo al la partopreno en la seminario kaj prezento de referaĵoj. Ni jam nuntempe ekceptas proponojn. Ĉi tio estas ekzemplo pri la scienca pritraktado de la problemoj de internacia lingva komunikado kunlabore kun la UN-amikaj rondoj.

Fine de aŭgusto estas aranĝata la 2a Studenta Esperanta Forumo pere de la Studenta Vojaĝ-Oficejo „Almatur". Estas planataj du kursoj — por gvidantoj kaj por instruistoj. Krome okazos diverstemaj diskutoj, prelegoj, ekskursoj k. t. p. Partoprenantoj de la kurso por instruistoj povos ekzamenigi por instruisto de Esperanto.

Estro de la Eksperta Kolegio de PSEK (d-ro J. Leyk) partoprenante la seminarion „Sciencaj aspektoj de Esperanto" en Ahrenshoop (GDR) prezentis prelegon pri la temo „Sociologio de la lingvo, Socilingvistiko, Interlingvistiko".

Kvar-persona delegitaro de PSEK reprezentos la Socialisman Asocion de Polaj Studentoj dum la 34a Internacia Junulara Kongreso en Veliko Tarnovo, Bulgario.

Ĉiuj interesitaj turnu sin por pli detalaj informoj kaj aliĝoj al la organizitaj aranĝoj al: Socjalistyczny Zwiazek Studentów Polskich ZW, Ogólnopolski Komitet Studenckich Kóz Esperanckich, ul. Fredry 7, 61-701 Poznán, Pollando.

★

Interlingvistiko en USSR

La 18an de marto, en Barnaul (Soveta Unio), okazis studenta scienca konferenco, kies interlingvistika sekcio traktis jenajn temojn: Ŝekspiro en Esperantaj tradukoj; Problemoj de sintakso en naturaj kaj artefaritaj lingvoj; Rolo de la latina en la kreo de E-gramatiko; Francaj poeziaj tradukoj en Esperanto; Anglaj frazeologiismoj en la internacia lingvo Esperanto.

I-a Internacia Interlingvistika Konferenco

Interlingvistiko kaj esperantologio nuntempe trovas sian ŝajne plej seriozan kaj konsekvencan kultivadon en la hungarlanda universitato Eötvös Loránd en Budapest. Ne eblas paroli aŭ skribi pri tiuj novaj esplorkampoj sen doni meritan lokon al tiu universitato, kies fakon Esperanto gvidas jam pli ol 10 jarojn prof. d-ro István Szerdahelyi.

Cetere, la fakgvidanto, lia asistantino Zsuzsanna Varga-Haszonits kaj liaj aliaj kunlaborantoj sin ne limigas simple al Esperanto. Lastatempe la Katedro por Ĝenerala kaj Aplikata lingvistiko, en kies kadro ekzistas la fako Esperanto, difinis la utilon de interlingvistika/esperantologiaj esploroj kiel principan kontribuon al la lingvoscienco, kiu helpas prilumi ĝeneralajn lingvosciencajn problemojn. Kelkajn gravajn atingojn la fako povas jam prezenti. Ekzistas konsiderinda nombro da universitate diplomitaj fakinstruistoj, pretiĝis valoraj (kaj bedaŭrinde tro nekonataj) interlingvistikaj faklaboraĵoj, diplomdisertacioj k. s., eldoniĝis universitataj lernolibroj, ekaperis la serio „Esperantologiaj Kajeroj“ (ĝis n-ro 3), estas preparata doktoriga disertacio de la asistantino, pluaj faklaboraĵoj kaj lernolibroj. Al tiu jam impona serio de gravaj atingoj aldoniĝas la multaj internacie prezentataj prelegoj de la fakestro kaj vico da seminarioj, kolokvoj kaj konferencoj, inter kiuj elstaras la I-a Interlingvistika Konferenco. Ĝin okazigis ja la universitato de Budapesto sed en kunlaboro kun la universitato Venecio. 50 interlingvistoj el ČSSR, FRG, GDR, Hungario, Israelo, Italio, Jugoslavio, Nederlando, Norvegio, Svedio kaj Usono prezentis 18 prelegojn. Oficialaj lingvoj estis Esperanto, hungara, itala, angla. Prestiĝan kadron al tiu konferenco donis la elpaŝoj de la dekano de la Filologia Fakultato prof. d-ro István Szathmari kaj de la estro de la Katedro pri Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko, prof. d-ro János Balász. Krome prelegis la estro de la katedro pri fremdlingvo kaj la ĉefredaktoro de la internacia revuo de la tradukistoj „Babel“. Cetere, „Babel“ raportos pri la konferenco. Jenajn prelegojn, kiuj rekte rilatas al interlingvistiko, oni prezentis: La nuntempa stato de la universitata instruado de interlingvistiko kaj esperantologio en Budapest (I. Szerdahelyi), La uzado de matematiko en lingvistiko (C. Minnaja, Italio), Komparo de etno- kaj planlingvo (D. Blanke, GDR), La lingvoprojekto „Loglan“ (J. Balbin, Usono), Determino kun kaj sen artikolo en Esperanto (F. Pennachietti, Italio), Problemoj de tradukado (Gyula Ferenczy, Hungario), Verba aspekto en Esperanto (B. Wacha, Hungario), Bazaj ecoj de la lingvopolitiko (J. Pool, Usono), Etnologio kaj interlingvistiko (J. Jermař, ČSSR), Sistemo de la internacia lingvo-uzo (A. Rátkaj, Hungario), Nacia ŝtato kaj internacia lingvo (P. Zlatnar, Jugoslavio), Problemoj de interlingvistiko kaj minoritata lingvistiko en USSR (P. Bragagila, Italio), Interlingva projekto de Komenio (V. Barandovska, ČSSR), La socia bazo kaj komunikiva efikeco de interlingvoj (H. Traunmüller, Svedio), Kriterioj por lingvotaksado en interlingvistiko (O. Reiersøl, Norvegio), Pliriĉigo de la morfemaro en planlingvo (R. Corsetti/M. la Torre/N. Vessella, Italio), Vortelekto en dulingvaj vortaroj (M. Šaturova, ČSSR), La internacia vortaro kaj ĝia signifo por la dezirinda formo de planlingvo (W. A. Verloren van Themaat, Nederlando), Bibliografio pri eblaj plan-

lingvaj fontoj en Esperanto (B. Golden, Hungario), Pri la ebla jidlingva kaj hebrea influo je Esperanto (D. C. Gold, Israelo).

La prelegoj aperos presitaj libroforme. La konferenco iniciatis la ideon iam fondi internacian interlingvistikan asocion.

Restas nur gratuli al la organizintoj kaj esprimi la esperon, ke la fenomeno Budapest ne restas unika, sed sekvos ĝin aliaj.

D. Blanke

Nova libro de Szerdahelyi

En la popularscienca hungara eldonejo Gondolat (Budapest) en 1977 aperis 400-paĝa, riĉe ilustrita kaj detale bibliografiita libro de Istvan Szerdahelyi „Bábeltöl a világugelvig", t. e. „De Babelo ĝis la mondlingvo".

*

Libroj pri Eroŝenko

Dudek kvin jarojn post sia morto, Vasilij Eroŝenko (1890 — 1952) fariĝas furora nomo en sia patrolando Soveta Unio. En 1977 en Moskvo aperis, en la eldonkvanto de 15 000 ekzempleroj, 263-paĝa elekto („Izbrannoe") el la verkoj de Eroŝenko kaj elĉerpiĝis en kelkaj tagoj, tiel ke ni malsukcesis havigi ekzempleron al la Biblioteko Hodler. Temis pri tradukoj de la verkoj de Eroŝenko el la japana, ĉina kaj Esperanto en la rusan lingvon. Ĵus aperis ĉe la sama eldonejo (Nauka) preskaŭ 300-paĝa biografio de Eroŝenko „Ĉelovek uvidevŝij mir" (Homo, kiu ekvidis la mondon) de A. S. Ĥarkovskij, denove en la eldonkvanto de 15 000 ekzempleroj. Lastatempe aperis libroj pri Eroŝenko ankaŭ en la ukraina lingvo. Krome, kelkaj lastaj jaroj alportis plurajn ruslingvajn studojn pri la vivo kaj verkaro de ĉi tiu Esperanta verkisto, kies ŝuldanto restas ankaŭ la Movado.

(„esperanto" 7-8/1978)

*

Koncize pri MEM 1953 — 1978

Sub tiu titolo aperis 24-paĝa broŝuro sub la redakto de Oldřich Knichal, kiu enhavas jenajn kontribuojn: William Gilbert „Sur la vojo al naskiĝo de MEM", Nikola Aleksiev „Misio kaj celoj", Oldřich Knichal „Historia Skizo", Simeon Podkaminer „Aktiva parto de la monda pacmovado". La broŝuron eldonis la ĉeĥoslovaka sekcio de MEM, 1978.

*

Kompara magistra disertacio

Sub la temo „Estudo comparativo do Esperanto com outras quatro linguas planejadas com o portugês" José Passini el Juiz de Fora, Brazilo, dum januaro 1978 sukcese defendis magistran disertacion en la Katolika Universitato de Rio de Janeiro, Brazilo.

La novaj Bazaj Taskoj kaj ni III

Por ĉiuj flankoj de la kulturo

Kulturligo, kiel ni legas en la unua Baza Tasko „kunagadas por la plua plialtigo de la materia kaj kultura vivnivelo de la popolo". Kaj krome „Kulturligo dediĉas sian atenton al ĉiuj flankoj de la kulturo: al la kulturo de la laboro kaj de la medio ĉirkaŭa, al la akcelado de scienco, tekniko kaj klerigo, al la flegado kaj alproprigo de la progresema heredaĵo (tradicioj — D. B.), al la evoluigado de socialisma-realisma arto-kreado, al la kulturo en interhomaj rilatoj, al la lingvo, kutimoj kaj moroj, al la aranĝo de la naturo kaj de la patrio kaj de la urboj kaj komunumoj". Jen vere tre granda programo.

Ni, esperantistoj, havas ŝancon kaj malfacilon samtempe. Ni estas membroj en prestiĝa kulturorganizo, kiu akceptas la larĝan kulturnocion (kiel citite).. Tio estas nia ŝanco, ĉar montriĝas tre multaj eblecoj senchave agadi per kaj por Esperanto laŭ tiu koncepto. (Cetere, i. a. pro tio ankaŭ en la nova Vortaro pri Kulturo, eldonota de Dietz-Verlag en Berlin, enestas granda artikolo pri Esperanto kaj la esperantista agado en KL!) La malfacilo estas en tio, vere larĝe kaj lerte uzi kaj eluzi tiujn eblecojn, samtempe donante propran memstaran kontribuon al la kulturagado en nia lando.

Necesas, ke ni pli kaj pli komprenu nin ne nur esperantistoj, sed entute anoj de komplekse aganta kulturorganizaĵo. Tio postulas kunagadon unue en nia propra organizaĵo.

Unuaj komencoj de kunlaboro kun aliaj sekcioj en KL jam ekzistas, ekzemple kun filatelistoj. Ankaŭ eblas ligi fotoamatoran agadon kun Esperanto. Kreo de diapozitivaj prelegoj pri belaj regionoj de nia lando kaj pri urboj estas la fako de la fotoamatoroj. Ni povus aldoni sonbendigitan Esperantan komenton, kaj jen ni havus belan donacon por amika grupo eksterlande.

Aŭ ĉiujare en la kadro de la Belartaj Konkursoj de la Universalaj Esperanto-Kongresoj estas organizataj foto-ekspozicioj. Jen utiligebla ŝanco!

Multas la eblecoj de kunlaboro al la sekcioj de la naturamikoj. Turismo, skribado de lokaj kronikoj, esplorado de la loka aŭ regiona historio (tion rilatige al la historio de la Esperanto-movado) k. t. p. estas nur kelkaj branĉoj.

Tute evidente eblecoj de kunlaboro ankaŭ ekzistas kun la komisionoj por astronomio, ornitologio eĉ por mineralogio. Ĉar, kiel konate, inter esperantistoj aktivadas astronomoj („Homo kaj Kosmo", konata revuo el Jugoslavio), ornitologoj (organo de la esperantistoj estas „La mevo") kaj geologoj. (Dum la lastaj jaroj aperis 3 volumoj de „Geologio Internacia".) Mi tuŝis nur kelkajn eblecojn kaj vidpunktojn.

Kiujn vi havas?

Detlev Blanke
(Daŭrigota)

Eĉ tio okazis

Artaĵo

Mirigite la sveda pentrartisto Jens Jonsen eksciis, ke unu el liaj pentraĵoj ekspoziciitaj en artgalerio en Stockholm plej bone plaĉis al la publiko. Mirigite li estis pro tio, ke al li tute ne estis konata la de li pentrita bildo. Vizito en la galerio solvis la enigmon. Peco da farbmakulita tolo, en kiu la artisto kutime envolvis sian paletron, estis pendigita sur la muro inter la pentraĵoj. La artaĵo estis nomita: „Vizio de nokto".

Sukcesplena oficejo

La „Oficejo de kontrolado de loĝejaj luprezoj" en la usona ŝtato Nebraska devis serĉi al si novan domicilon. La posedanto de la ĝis nun luita konstruaĵo altigis la luprezon tiom, ke ĝi ne plu estis tolerebla.

Relativa soleco

En Bruselo viro sendis sian foton al la damklubo „Solecaj koroj". Evidente li ne estis benita per beleco, ĉar tre baldaŭ oni resendis lian foton kun la noto: „Bedaŭrinde — sed tielgrade solecaj ni verdire ne estas!"

Fulmotondro

Post terura pluvego la meteorologia stacio de Milano ricevis la sekvajn liniojn: „Eble estas por vi interese ekscii, ke mi pasigis la pasintan nokton elpumpante el mia kelo la de vi antaŭdiritan „malkompaktan nubaron".

Ĉiam pura

38-jara viro en vilao en Ulm, GFR, rompŝtelis du tabakujojn kaj valoran fotoaparaton. Poste li malplenigis la garderobejon de la domposedanto por elegante vestiĝi. Dum tio lin kaptis la deziro sinbani. Pensite, farite. Sed kiam li kuŝis komforte en la bankuvo surprize revenis la dommastrino. La neinvitita gasto nur petis lasi lin trankvile finbani. Kiam venis la polico li senreziste kuniris.

Patentita recepto

Aŭskultanto de Dana Radio demandis, ĉu ekzistas tutcerta rimedo por protekti fumaĵitan ŝinkon kontraŭ putrado. Sprita redaktoro respondis: „Oni zorgu ke la ŝinko estu laŭeble malgrasa kaj metu ĝin sur bele aranĝitan tablon. Poste oni verŝu freŝan bieron en la glasojn, sidiĝu kun bona apetito — kaj la problemo estas jam solvita."

Kriminalpedagogo

De instruisto proksime de Göteborg, Svedio, iu ŝtelis du kuniklojn. Ĉar la polico ne sukcesis eltrovi la ŝteliston la instruisto verkigis la lernantojn eseon. Temo: „Nia dimanĉa tagmanĝo". Du lernantoj priskribis bonegan kuniklan rostaĵon. La ŝtelintoj rapide estis senmaskigitaj.

Kompilis L. Knöschke

Esperanto-Teatroj en Bydgoszcz

En Bydgoszcz (Pollando) dum la 1. — 4. de junio 1978 okazis III. Internacia Esperanto Renkonto „Bydgoszcz-78". Partoprenis ĝin pli ol 800 geesperantistoj el 10 landoj.

La Renkonton aranĝis Pola Esperanto Asocio en Bydgoszcz, Vojevodia Kulturdomo en Bydgoszcz, Buroo de Junulara Turismo „Juventur" kaj Centro de Turismo de Pola Esperanto Asocio en Bydgoszcz. La Organiza Komitato konsistis el 60 geesperantistoj.

Fleje impresis la partoprenantojn la Teatraj Esperanto-spektakloj. Studenta Esperanto-Teatro el Zagrebo (Jugoslavio) prezentis de Norma Serment „La nevidebla Leonardo", Esperanto-Teatro el Helsinki (Finnlando) ludis fragmenton el „Kalevala", „Patrino de Lemminkainen" kaj „Unuan Helpon" de M. Boulton. „Tespa" el Parizo (Francujo) aktoris „La kalva kantistino" de Eŭgeno Jonesko. Jadwiga Gibczyńska el Krakovo (Pollando) prezentis „Slavajn Fabelojn" de Bolesław Leśmian kaj Pola Esperanto-Teatro el Varsovio „Hipnoton" de A. Cwojdziński. Interesan muzikpoetikan programon „Herbo, Herbo" surbaze de poezi de Julian Tuwim prezentis ensemblo „Labirintoj" el pola urbo Inowrocław. Grandegan sukceson atingis la Tutpollanda Trarigardo de Esperanto-Muzik-Ensembloj, al kiu aliĝis 7 ensembloj el tuta Pollando. Du koncertoj daŭris sep horojn, dum kiuj oni prezentis pli ol 80 diversajn E-kantojn. La unuan premion ricevis ensemblo „Anda" el Bielice, la duan „Bravuloj" el Bydgoszcz kaj la trian „Esperaĵo" el Gliwice. „Anda" ludos dum la 34 IJK de TEJO en Veliko Tirnovo kaj dum la 63. UK en Varna ludos kaj „Anda" kaj „Bravuloj". Jam nun oni planas okazigi en Bydgoszcz en 1979 jaro Internacian Konkurson de Esperanto-Kantoj.

La riĉan programon de la Renkonto kompletigis Junulara Esperanto-Ekivako kun pli ol 150 partoprenantoj, vizitadoj de la urbo Bydgoszcz, Vespero de Amikeco, Seminarioj de fervojistoj-esperantistoj, „Historio de pola fervojo" kaj de ornitologoj-esperantistoj pri „Protektado de la hommedio kaj birdoj".

Okaze de la Renkonto estis eldonitaj: „Itineroj je la nomo de Ludoviko Zamenhof en Pollando", „Malgranda pola-esperanta kaj esperanto-pola fervojista terminaro", lernolibro „Esperanto dum junularaj feriadoj" kovertoj pri 70 jaroj de UEA kaj PEA kaj pri Tagoj de Bydgoszcz. Esperanto-notlibroj, globkrajonoj kaj E-ĉemizoj. La sukcesa Renkonto, pri kiu larĝe informadis pola gazetaro kaj radio estis aranĝita jam tradicie okaze de TAGOJ DE BYDGOSZCZ, sub protekto de la Fako pri Kulturo kaj Arto de la Urba Oficejo de Bydgoszcz kaj de la Societo de Bydgoszcz-Amantoj.

Multaj partoprenantoj jam nun aliĝis al la venontjaraj TAGOJ DE BYDGOSZCZ.

*

Numero de „Kontakto" pri malarmado

La revuo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), „Kontakto", en sia numero 57 (1/78) publikigis riĉan materialon pri la altaktuala temo malarmado. Per tiu numero la redakcio kiel ofte dediĉis atenton al brulaj temoj de la nuntempo. La numero i. a. entenas la raporton de la laborgrupo „Junularo kaj Malarmado", kiun gvidis Jürgen Hamann en la kadro de la 33a Internacia Junulara Kongreso 1977 en Poitiers (Francio).

Ekspozicio

Samarkanda Esperanto-klubo de Interpopola Amikeco aranĝos grandan porpacan ekspozicion, kies ekspoziciaĵoj estu ricevitaj nur pere de Esperanto. Ni esperas, ke ĉiulandaj geesperantistoj-pacbatalantoj helpos al ni je tiu ĉi grava entrepreno kaj sendos al ni konvenajn materialojn (salutleterojn, porpacajn afiŝojn, flugfoliojn, deklarojn, rezoluciojn, ĵurnalojn, revuojn, librojn, desegnaĵojn, fotojn de porpacaj manifestacioj, kunvenoj k. t. p.). Sendonte al ni diversaĵojn por la porpaca ekspozicio vi helpos al ni duoble: unue, propagandi por la paco kaj amikeco inter popoloj; due, vi helpos al ni pruvi la taŭgecon de Esperanto por tiu ĉi nobla celo. Ni nepre respondos al ĉiu amik(in)o, kiu sendos al ni ekspoziciaĵon. Anticipan koran dankon al ĉiuj!

Bonvolu sendi ĉion laŭ la adreso: Anatolo Ionesov, SU-703000 Samarkando, ul. Sovetskaja 53, Uzbekistano.

Karaj ĉiulandaj geesperantistoj! Ni konsideru ke la mondpaco estas la afero de ĉiuj kaj de ĉiu, tial bonvolu fari ĉion eblan por sukceso de la ekspozicio.

Jubileo

Subtenu bonan iniciaton! Ĉijare siberia urbo Krasnojarsk (Sovetunio) festas 350-jaran jubileon de sia fondiĝo. Krasnojarskaj geesperantistoj deziras organizi grandan internacian ekspozicion de infandesegnaĵoj dediĉe al tiu ĉi fama datreveno. Sukceso de la iniciato dependas de vi, karaj eksterlandaj geamikoj! De vi ĉiuj kaj de ĉiu aparte.

Helpu al viaj gesamideanoj el malproksima Siberio: kolektu la desegnaĵojn kaj sendu al adreso: USSR, 660075, Krasnojarsk, ab/ja 2420, Esperanto-klubo. Ĉiun sendanton ni informos pri la ekspozicio.

Membroj de Krasnojarska E-klubo

Respondo garantiata!

Krasnojarska urba esperantista klubo estas nun unu el la plej aktivaj E-kluboj de Sovetunio. Ĝian aktivon formas studentoj, laboristoj, oficistoj, instruistoj kaj lernantoj. Ĉiuj sesdek geaktivuloj deziras korespondi. La klubo volonte subtenas kolektivajn kontaktojn kun eksterlandaj E-organizaĵoj. Ĉiu dezirante korespondi trovos en la klubo korespondamikon pri la plejmulto de kutimaj korespondtemoj. Do, dezirantoj skribu laŭ adreso: USSR, 660075 Krasnojarsk, abonkesto — 2420, E-klubo.

Esperantista delegacio de Kulturligo en Minsk

De 19. — 24. 4. 1978 en Minsk/Soveta Unio restadis oficiala delegacio de Distrikta Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, Potsdam. La reprezentantoj Hanna Scheffs kaj Karl Müller establis amikajn kontaktojn kun anoj de la Esperanto-Klubo el Minsk kaj priparolis la estontan komunan agadon. Estas en preparo amikeckontrakto.

Seslingva fakvortaro

Esperanto en sciencon kaj teknikon. Paŝo post paŝo realiĝas tiu postulo. En la jaro 1976 eldonis la „Geodezia kaj Kartografia Entrepreno en Budapest“ (Budapesti Geodéziai és Terképészeti Vállalat) sub la respondeco de d-ro Gebry János kaj aŭspicio de la hungara tutlanda mezurado „Geodezian Fakterminaron en ses lingvoj — Unua volumo“ (Hatnyelvü Geodéziai Szakszótár — Elsö Kötet).

Konforme al la ses uzitaj lingvoj, angla, franca, germana, hungara, rusa kaj Esperanto, konsistas la verko el ses partoj. Ili enhavas specifan terminologion rilate al scienco kaj tekniko de termezuro kaj kartografio. Ĉefredaktoro estis Csatkai Dénes. La Esperantan parton prilaboris Haszpra Ottó.

La hungarlingva indekso entenas 1158 fakesprimojn signitajn per sinsekvaj numeroj de 0001 —1158. Ĉiu termino aldone estas fake difinita hungarlingve kaj poste sekvas la traduko de la termino en la ceteraj kvin lingvoj. Same kiel la hungara indekso enhavas la kvin aliaj partoj la nacilingvajn terminojn en alfabeta sinsekvo, sed indikas nur la respektivan hungaran tradukon kune kun la koresponda numero. Se uzanto ne bezonas la hungaran tradukon, sed alian el la ceteraj kvin lingvoj, li trovas ĝin tuj perhelpe de tiu numero en la hungara parto.

Tamen tiu praktika aranĝo ne plene kontentigas. Bedaŭrinde estas kompilitaj ekskluzive en hungara lingvo ne nur la difinoj de ĉiuj terminoj, sed ankaŭ la antaŭparolo kun la por la uzantoj gravaj rimarkoj kaj klarigoj. Sekve permesas la eldono senkomplikan kaj plenan eluzon nur al hungaroj.

Forigi tiun mankon jam sufiĉus aldono de esperantlingva traduko de la antaŭparolo kaj termino-difinoj, kiel jam sukcese praktigis aliaj aŭtoroj de plurlingvaj fakaj vortaroj. (Vidu la „Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj“ eldonita 1974 en Nederlando.)

Ĉar Esperanto estas internacia lingvo, ĉiu interesulo, kiu ajn lingvon li ankaŭ parolu, per la menciita Esperanta-kompletiĝo eblas informiĝi senpene. Tiun specifan avantaĝon de Esperanto la eldonantoj ne sufiĉe elĉerpis. Atentante tiun vidpunkton la valoro kaj disvastiĝo de tiu utila kaj laŭdinda publicaĵo pligrandiĝus senteble, kaj plialtiĝus samgrade ankaŭ efiko kaj prestiĝo de Esperanto.

Erich Würker

*

Faltblatt „Kennen Sie Esperanto?“

Der Bezirksarbeitskreis Esperanto Halle gab kürzlich ein Faltblatt heraus, das in übersichtlicher Form über die Bedeutung und sprachliche Struktur des Esperanto informiert: 9 Tatsachen über die internationale Nutzung sowie Übersichtdarstellungen zur Aussprache, Sprachlehre, Wortbildung. Es enthält weiterhin eine Sprachprobe sowie Hinweise auf Lernmaterialien und Literatur über Esperanto. Das Faltblatt kann über den Zentralen Arbeitskreis Esperanto (108 Berlin, Charlottenstraße 60) zum Preis von —,05 M bezogen werden.

Esperanto-Ekzpozicio ĉe „Leipzig-Information"

Enrigardon de la laboro de E-istoj en Leipzig donis ekspozicio, okazinta fine de januaro '78 dum tri semajnoj en la akceptejo de „Leipzig Information".

La prezentitaj ekspoziciaĵoj, enkadrigitaj en 10 vitrinoj donis resumon pri la disradianta forto de la neforpensebla lingvo Esperanto dum naŭ jarcentoj.

Eldonoj de verkoj en Esperanto, aperintaj komence de ekfloro de la lingvo antaŭ la unua mondmilito, kiel „Versaĵoj" de Schiller, „Libro de Kantoj" de Heine, „Rakontoj" de Ĉeĥov kaj aliaj estis videblaj, same kiel ankaŭ la verkoj el nia nuntempa epoko „Nuda inter lupoj" kaj „Trigroŝa romano" demonstris la altan lingvan nivelon pere de Esperanto.

Ni havis la ŝancon demonstri ankaŭ al la rigardintoj, ke Esperanto bone funkcias kiel interkomprenilo kaj informilo en ĉiuj sferoj de homaj interesoj.

Komencita per la historio de Esperanto ek de la unuaj paŝoj de la disvastigo de la kreinto d-ro Zamenhof ĝis la hodiaŭa tempo interesigis multajn scivolemajn vizitintojn.

Kompreneble ne mankis la atentigo al „Radio Varsovio" pri la el sendoj en la internacia lingvo kiel ankaŭ la anonco de la okazinta 63a UEA-Kongreso en Varna 1978.

Varbfolioj kaj aliaj propagandmaterialoj kompletigis la ekspozicion. Unua granda paŝo komence de 1978 jaro por propagando kaj varbado por la internacia lingvo. Ni daŭrigos nian senlacan fervoron!

Gerhard Böttcher

Junulara Seminario en Bydgoszcz

De 1-a ĝis 4-a de junio 78 Pola Esperanto Junularo invitis al seminario kun junaj aktivuloj el kelkaj landoj. El GDR partoprenis Michael Lennartz kaj Renate Levin, membroj de la Estraro de la Junulara Komisiono ĉe CLE. La seminario traktis pri problemoj de la kunlaboro inter la junularaj Esperanto-grupoj.

Junulara Seminario en Szolnok-Tiszaliget

Laŭ invito de Hungara Esperanto-Junularo de 18.—24. Julio 1978 okazis seminario por junaj esperantistaj aktivuloj en Szolnok-Tiszaliget, Hungario. El GDR partoprenis Peter Bartos kaj Eva Wolf.

Denove Esperanto-suplemento

La soveta revuo „Moscow-News" en sia numero 28 (2808), de la 15a de julio 1978 denove enhavas en sia anglalingva eldono suplementon en Esperanto. Ĉifoje temas pri la plena teksto de la Konstitucio (Baza Leĝo) de USSR.

Artikolo de Podkaminer

La konata veterano de la sovetunia Esperanto-movado, la aktivulo de Mondpaca-Esperanto-Movado, S. N. Podkaminer, publikigis en „Moscow News" n-ro 29 (1663) de 22a de julio 1978 ampleksan artikolon „La sovetaj esperantistoj".

Recenzo: Bulgara Lernolibro

En Bulgario aperis nova lernolibro por komencantoj, „Lernolibro de Esperanto por la unua lernojaro“. Ĝi konsistas el du enkondukaj kaj 26 ĉefaj lecionoj; krom tio ĝi enhavas 5 ripetajn lecionojn. Legante la enhavtabelon, oni povas kontente rimarki, ke ne gramatikaj, sed ĉiutagaj paroltemoj donas al studanto la direkton de lia okupiĝo pri Esperanto.

La temoj ampleksas ekzemple la lernejon, la familion, la homan korpon, ekskursojn, feriojn, la junpioniran organizon, la laborbrigadon, la kulturan vivon, la belan patrolandon Bulgarion, la Unuan de Majo, la organizan laboron de la esperantistoj. Evidentiĝas, ke tiu ĉi nova lernolibro laŭ temelekto plenumas gravan lernpsikologian postulon: La instrumaterialo devigu la lernantojn ke ili malkovru siajn pensojn pri diversaj vivsferoj. Foliumante la lernolibron, oni estas surprizita per la granda nombro de ilustraĵoj, kiuj konvinke klarigas novajn gramatikaĵojn. Tial alia lernpsikologia postulo estas plenumita: Tipaj ecoj de la fremda lingvo estu instruataj tiamaniere, ke ili en la cerbo de lernanto ligiĝu kun personaj impresoj, travivaĵoj kaj emocioj.

Ĉiu leciono estas pliriĉigita per ekzercoj, kiuj celas al ellaborado ĉe lernanto de diversspecaj lingvokapabloj: bela skribado, preciza lingvologika pensado, memstara formado de esperantlingvaj respondoj aŭ demandoj ktp. La lernolibro meritas rekonon pro sia eduka tendenco: Lernante Esperanton laŭ tiu ĉi libro, vi ekkonas multajn sciindaĵojn aŭ politikajn principojn, ekz.:

— „La patrolando postulas de ni esti fortaj, sanaj kulturaj kaj saĝaj civitanoj“ (sepa leciono);
— „Ĝi (t. e. la bulgara popolo T. D.) inde plenumas la testamenton de nia instruanto Georgi Dimitrov — en 15—20 jaroj atingi tion, kion aliaj popoloj ĉe aliaj kondiĉoj atingis dum tuta jarcento. Kaj tiu tasko estis plenumita“ (deknaŭa leciono);
— „En la Parko de la Libero ni vizitis la Fratan Tombejon de la pereintoj en la batalo kontraŭ la faŝismo. Ni haltis ĉe la Monumento de la Soveta Armeo (deknaŭa leciono).

Sendube, ankaŭ tria postulo al vera lernolibro de fremda lingvo estas praktike uzita: La lernado de iu fremda lingvo samtempe formu la personecon de lernanto.

Tiu tria postulo havas plej gravan signifon por la instruado de internacia lingvo Esperanto. Ni konvinku la popolojn kaj pacamantajn registarojn pri la volo de esperantistoj en socialismaj landoj, partopreni la konstruadon de la nova socio kaj batali por ĝi!

Kelkaj rimarkoj pri eventuala plibonigo de la priparolata bulgara lernolibro:

Unue — Ekde la unua ĝis la fina leciono ĉiuj laborinstrukcioj estas formulitaj en bulgara lingvo. Kial ne paŝo post paŝo anstataŭigi la bulgarlingvajn instrukciojn per esperantlingvaj? Tiel la lernantoj pasante povus pligrandigi sian pasivan vorttrezoron.

Due — La minusklo „k“ en la manskriba formo estas donita kirile („K“, p. 6 kaj 31), ĝi estas skribenda en latina skribmaniero „k“.

Entute — rekomendinda lernolibro de Esperanto! Mi esperas, ke ĝi influu krean rilaton al fremdlingva metodiko flanke de niaj instruantoj kaj instruistoj.

T. Dahlenburg

Kafejo „Esperanto“ en Vroclavo

La direkcio de la Vojevodia Konsum-Kooperativo „Spolem“ en Vroclavo decidis nomigi novkonstruitan kafejon, la Kafejo „Esperanto“. Ĝi situas en moderna kvartalo proksime de la Ĉefa Stacidomo. La menuo kun Esperanta informilo estas presita dulingva kaj kelnerinoj post la kurso priservados la gastojn ankaŭ en la internacia lingvo. En la kafejo troviĝas anguleto kun Esperantaj gazetoj. Sendu gratulojn al la adreso: Kafejo „Esperanto“, str. Komandorska 147, PL 53-344 Wroclaw. Vroclavo estas grava turisma centro, miljara urbo kun multaj antikvaĵoj situanta ĉe kruciĝo de internacia aŭtovojoj: E-12, E-22 kaj E-83. Pri la tranokto-eblecoj informas: Vroclava Esperanto-Klubo, 50-952 Wroclaw 17, str. Dubois 3, tel. 22 - 69 - 54.

*

Esperanto-Presse-Dienst

Der Bezirksarbeitskreis Esperanto Leipzig gibt periodisch einen Esperanto-Presse-Dienst heraus, der an sämtliche Zeitungen des Bezirkes Leipzig gesandt wird. Der Initiator und Autor dieses Dienstes, Jürgen Hamann, 701 Leipzig, Käthe-Kollwitz-Str. 15, ist sicher gerne bereit, über gemachte Erfahrungen zu informieren.

*

Bestellung des neuen Esperanto-Lehrbuches

Das „Taschenlehrbuch Esperanto“ von Dr. päd. Till. Dahlenburg und Peter Liebig wird Ende dieses Jahres im Enzyklopädie-Verlag erscheinen. Sie können bereits jetzt Ihre Vorbestellungen bei Ihrer Buchhandlung aufgeben. Bestell-Nr. 57 66 114.

*

Ni gratulas

- al Kurt Heeg, Fraureuth, pro distingo per la J.-Becher-Medalo en bronzo.
- al Karl Keßner, Berlin, kiu fariĝis 90-jara la 24. 6. 1978.
- al Artur Mildner, Pirna, kiu festis sian 80-an naskiĝtagon la 22. 9. 1978.

*

Wanderausstellung Esperanto?

Wir suchen grafisch und handwerklich begabte Bundesfreunde, die bereit wären, ein montierbares Ausstellungsobjekt Esperanto (möglichst auf Ausstellungskartons oder -platten) anzufertigen, das an Bezirke und Kreise ausgeliehen werden soll.

Wir bitten um Vorschläge. *ZAK Esperanto*

*

En germanlingva lernolibro

„Deutsch für schreibtechnische Berufe“ (germana lingvo por skribteknikaj profesioj) nomiĝas instrua kaj ekzerca libro por faklaboristoj eldonita de eldonejo „Die Wirtschaft“, Berlin 1977. En ĝi sur paĝo 201 ni trovas preskaŭ unupaĝan eltiron el priesperanta artikolo (Urania 5/73).

KORESPONDDEZIROJ 31635

GDR

Gesinjoroj Alfred kaj Edith Nagel, **1953 Fehrbellin,** Geschw.-Scholl-Str. 10, (58 k. 44j., maŝinisto k. edukistino) dez. kor. tutmonde pri vojaĝoj, interŝ. il. pk

Dipl. ekonomo dez. kor. pri aeronaŭtiko k. navigacio: Richard Partecke, **59 Eisenach,** Am Ofenstein 5

Hispanio

Evaristo Gil Pallarés, Apartado 875, **Barcelona,** dez. kor., kol. poŝtstampojn

Japanio

E-rondo de Tutlanda Telekomunikista Laborsindikato (ZENDENTU) dez. kor. tutmonde k. E-rondoj p. ĉ. t. bv. skribi al Hirosi Arai, **Oaza-Kami 1366-1,** Ageo-si 362, Saitamaken
Ni prezentas al vi korespondantojn de Japanio. Skribu al ni preslitere viajn aĝon, sekson, profesion, hobion kaj adreson espereble kun foto: Japana Esperanto-Instituto, Waseda-Mati 12–3, Sinzyuku-ku, **Tokio 162**

Jugoslavio

Lernanto, 18j., dez. kor. k. gejunuloj 16—18j. el GDR: Zoltan Dudaŝ, **24000 Subotica,** Frederika Šopena 74

Kolombio

Luis Martinez, Solis, kesto aerpoŝta 6950, Medellin, dez. kor. Jorge Velasquez G., Apartado Aero 51740, **Medellin** dez. kor.

Norvegio

Dez. kor.: Hardanger Folkehogskule, **577 Lofthus**
Norsk Esperanto Forbund v/Loerei Elna Malland, **4200 Sauda**

Usono

Charles F-Post, 1150 Pico Avenue, Pacific Grove, **Californio,** 93950, 69j., dez. kor. kol. pm
Flegistino, 66j., komencantino ,dez. kor. tutmonde: Andra Anderson, 1721 Westport Rd., **Aberdeen,** Washington, 98520

Peruo

Alberto Carrillo Ramirez, Av. Venezuela 1172, Apartado 40 t, **Lima**
Cecilia Alegria, Casilla **11031,** Santa Beatriz, **Lima-4**
D-ro José Rerard, Av. Agamos 1192, Dpto. 2-A-Miraflores, **Lima-18**
Janet Skotte, Malecón Paul Harris, 336-200, Barranco, **Lima-4**
Luis Cardenas, Jackson, Av. Orrantia 198, San Isidro, **Lima-27**
Pedro I, Núnez Diaz, Apartado **163, Cajamarca**

Pollando

Zbigniew Pulchny, **93208 Lodz,** str. Tatranska 94 m 31, 25j., dez. kor. p. ĉ. t.
Instruisto de elektrotekniko kol. bk, pm, Wojciech Szcakowski, **91763 Lodz,** ul. Staszia 19 m 5
Agnieszka Zilenas, **15424 Bialystok,** ul. Lipowa 37 m 2, 24j., dez. kor. p. ĉ. t., kol. insignojn, flagetojn
Junulo, 18j., dez. kor. k. germana junulino, kol. bk.: Ryszard Wysocki, ul. J. Krasickiego 51, **37-100 Laucut TMR,** woj. Rzeszow
Aleksandra Zabinska, ul. Przemysłowa 28, **14-150 Olsztynek,** dez. kor. pri arbaro kaj ĉaso

Vjetnamio

Vjetnamaj gekursanoj volas korespondi tutmonde, sed precipe kun Japanio, Bulgario kaj Hungario. Skribu al la kursgvidanto: s-ro Ngô Chân Lý, 539/TK2/20 Trân hung-Dao, **T. P. Hó Chi Minh,** Vjetnamio

---

Herausgeber: Kulturbund der DDR (Zentraler Arbeitskreis Esperanto)
Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. – Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. – Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 775